

UNU LECIONO PRI ESPERANTO POR ĈIU LERNEJANO EN LA TUTA MONDO

Informa kaj instrua strategio lanĉita de laborgrupo kaj subtenata de ILEI

La baza ideo venas de Klaus Friese el Germanio. La ideo kuris tra diversaj retlistoj kaj multaj homoj subtenis, subtenas, volas puŝi, volas fari. La ideo kompreneble atingis ILEI-n, la Ligon de Esperantistaj Instruistoj. La prezidantino Mireille Grosjean, kiu instruis la francan en Alemano (germanparola parto de Svislando) kaj la germanan en Romandio (francparola parto de Svislando) dum 38 jaroj laboris por prepari diversajn etapojn de tiu strategio.

La ideo estas, ke ĉiuj lernantoj aŭdu tian lecionon en la aĝo de 10 ĝis 18.

Laborgrupo preparis dokumentojn.

Pretas letero, kiu iru al decidantoj pri edukado je ĉiu nivelo (urba, provinca, kantona, ŝtata) ; pretas listo de kanaloj : lernejestroj, instruistoj, lingvoinstruistoj, gazetoj por instruistoj, sindikatoj por instruistoj, lertigejoj por instruistoj, universitatoj, lingvocentroj, aŭtoroj de lernolibroj, eldonistoj de lernolibroj, institutoj, kiuj okupiĝas pri edukado, plurlingvismo k.s.

Pretas strategio pri la kerna punkto : kiu donu tian lecionon ? Jen ĝi. Povas esti iu esperantisto, kiu ricevas permeson eniri lernejon kaj fari la laboron. Povas esti iu instruisto, kiu helpe de la disponigita materialo prezentas Eon al sia klaso. Povas esti iu lernanto, studento, kiu ricevas materialon kaj/aŭ fontojn, kaj esploras mem cele al prezento en sia klaso.

Poste nepras krei statistikon, verki raporton kun indiko de loko, dato, rimedoj, rezultoj. Tio devus okazi naciskale.

Pretas materialo por tia leciono. La materialo dividiĝas en tri kategorioj. La unua estas **Krozado** sur la lingvoj. Male al la kutimo, kie oni lernas UNU lingvon, en tiu krozado oni konsideras UNU ASPEKTON de lingvo kaj observas, kiel diversaj lingvoj solvas la problemon. Ekzemple oni povas observi la nombrojn inter dek kaj dudek por vidi, ekde kiu nombro aperas la vorto dek. En EO tute facile jam en la nombro dekunu aperas la vorto dek. Same en la japana : *ju* = dek ; *ichi* = unu ; *ju ichi* = dekunu. Male en la germana, kie ekzistas du vortoj *elf* kaj *zwölf* por dekunu, dekdu. Nur poste venas dektri : *dreizehn* (*drei* estas tri, *zehn* estas dek). Esploru en via lingvo ! Tia cerba gimnastiko pri lingvoj, krozado inter la lingvoj, salto de lingvo al lingvo, similas al varmigo de la korpo antaŭ forta sporta streĉo. Post tiaj ekzercoj eniri unu lingvon aperas facila tasko. En la materialo por LA leciono estas nun pretaj kvin tiaj malsamaj amuzaj aktivajtoj. Pretas ankaŭ kvar dokumentoj pri EO, **faktoj**, sen fantazioj.

Pretas ankaŭ **enkonduko al la lingvo mem** en kvin dokumentoj, oni povas nomi ilin **kursetoj**. Entute 14 dokumentoj, ĉiuj estas unupaĝa.

Ĉiuj dokumentoj estas en EO. Kompreneble iu devos traduki ilin al la loka lingvo antaŭ la uzo. Ĉio jam ekzistas en la franca ĉe Mireille Grosjean, kiu uzis la 14 erojn dum jaroj en sia profesia vivo kaj plu uzas ilin okaze de lingvofestivaloj k.s. Ŝi prezentos la krosadon en la ILEI-kongreso en Busano, Koreio.

En Hamburgo Klaus Friese vizitis jam pli ol cent lernejojn por alporti sian libreton pri Esperanto. La libreto same kiel ĉiuj supre menciitaj dokumentoj troviĝas en la retejo de ILEI <http://www.ilei.info/agado/projektoj.php>

Strategio. La laboro devas esti farita en la landoj mem, fare de lokaj esperantistoj, kiuj konas la strukturon de la instrusistemo, la redakcejojn de la gazetoj, la favorajn kondiĉojn por tia paŝo. La plej favora metodo kiel ĉiam estas vitamino K por konatuloj : se vi konas ĵurnaliston, vi pli facile eniros la redakcejon de la gazeto ol se vi simple skribas al la poŝta adreso !

Ni rememoru gravan parton de la dua UNESKO-rezolucio de 1985 : « UNESKO invitas la Ŝtatojn-Membrojn marki la centjariĝon de Esperanto per konvenaj aranĝoj, deklaroj, eldono de specialaj poŝtmarkoj kaj simile, kaj instigi al la enkonduko de studprogramo pri la lingvo-problemo kaj pri Esperanto en siaj lernejoj kaj siaj institucioj de supera edukado. »

Mireille Grosjean

Prez de ILEI

Ilei.prezidanto@gmail.com